



# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO  
DE LA  
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :

Lucien BOURGOIS,  
21, Rue Gambetta,  
NOYELLES-GODAULT (62)

Kotizoj (kun bultenservo)

a) Junuloj : 2 Fr.  
b) Aktiva membreco : 3 Fr.  
c) Subtenanto : 5 Fr.

Fédération Espérantiste du Nord de la France,  
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (62).  
C.C.P. LILLE 517-15

---

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (62).

---

Informilo n° 2

Marto-Aprilo 1965

## ESPERANTA TAGO

Lille-Foiro

9-an de ~~Majo~~ 1965

Estimataj Federacianoj,  
Karaj eksterlandaj gastoj,

La NFEF kore invitas vin honori per ĉeesto la federacian renkontiĝon, kiu okazos en Lille, la 9-an de majo, laŭ la jena programo :

9.30 h.	Rendevuo en la Honorhalo (Grand Palais), C-Halo.
10.00 - 12.00 h.	Filmo - Skeĉoj kaj ludoj.
12. - 15 h.	Honorvino en la bankedejo, sur la unua etaĝo.
12.30 h.	Aferkunsido.
15.00 h.	<u>Ĉe la tagordo</u> : 4-a Markola Kongreso en Ostendo. Federacia Kongreso en Amiens.

Konstanta Esperanto-budo funkcios dum la tuta foira daŭro, nome : de la 24-a de aprilo ĝis la 9-a de majo (standoj 7052-7054).

Esperanta tago en Lille (sekvo) :

Fervojaj kongresrabiloj - Senpagaj Foirentroloj :

Por ambaŭ, oni sin turnu, kun reafranko, al :

- S-ro René CURNELLE, 26, Rue des Martyrs-de-la-Résistance,  
LAMBERSART (Nord).

Ankaŭ, se vi partoprenos la bankedon, anoncu vin, kiel eble plej frue, al la Ĉisupra adreso

N.B. - La kunsendita karto signita per federacia stampo validas kiel senpaga foirentrolo.  
Alvenante, prezentu ĝin ĉe la foira akceptejo.

Rimarko : Nia Lille-renkontiĝo estos franca-belga-nederlanda.

Jam anoncis sian partoprenon S-ro MAERTENS, el SINT-KRUIS (Belgujo) kun grupo el Bruĝo kaj S-ro De BRUYNE (Bruselo), kiu gvidos membrojn de la Belga Esperanto - Fervojista Asocio.

Ankaŭ venos Ges-roj WEBER k filo el MIDDELBURG (Nederlandoj).

Ni sincere esperas, ke la aliaj Belgoj, kiuj jam ĉeestis en Lille povos partopreni.

Sekve, ne hezitu : tuj notu la daton (9-an de Majo) en vian agendon kaj rezervu tiun tagon por via esperantista vivo!

Ĉiuj en Lille! Venu kaj venigu geamikojn! Antaŭdankon!

La federacia estraro.

---

Sukcesa Federacia Printempa Renkontiĝo en Méricourt.

Ĉeestis ĉ. 60 esperantistoj, el kiuj 3 Nederlandanoj.

Post vizito de la bela ekspozicio la partoprenantoj iris al la urbdomo, kie afable akceptis ilin per honorvino la urbestro.

La urbestro, S-ro HOTTE, eldiris bonvenvortojn, esprimante sian simpatian por nia celo kaj certigante nin pri lia apogo. Ankaŭ, li kaptis la okazon por sciigi, ke nia membrino, S-ino Van PARYS, ĵus elektita kiel magistratanino, verŝajne fariĝos vicurbestrino.

Posttagmeze, en ĉeesto de 300 personoj, okazis la publika matineo. Ni vidis esperantajn infanajn skeĉojn, kiujn reĝisoris S-ino Van PARYS, estrino de bublernejo kaj, se Esperanto ja nur trovis malgrandan lokon, tamen tion kompensis la gracia dancado de la baletistinoj : "la Libeloj".

Antaŭ ol foriri, kelkaj esperantistoj interpretis la "Kanton de l' revido". Post la loterio, nome de la federacio la Ĝenerala Sekretario S-ro DITACROUTE donacis florbukedon al la dancestrino, F-ino PARENT, aplikante al la tradicion "artiklon 12-an", postulitan de la ĉeestantaro!

Ni gratulas niajn fervorajn kaj sindonemajn LKK-anojn, Ges-roj Van PARYS, pro la bona aranĝo kaj S-inon Van PARYS pro ŝia nova urba funkcio.

4-a MARKOLA KONGRESO

OSTENDE (Belgujo)

PENTEKOSTE 5-6-7 JUNIO 1965

Estimataj Federacianoj,

La NFEF elkore invitas vin partopreni la 4-an Markolan Kongreson en OSTENDO.  
Kotizo (tritaga) : 105 Belgaj Frankoj = 10,50 Francaj Frankoj.  
Por familianoj kaj gejunuloj malpli ol 25 jaroj : 7,50 FF.  
Unutaga partopreno : 3 FF.

PROGRAMO :

Dimanĉe 6-an de junio

10.00 h En Festpalaco, WAPENPLEIN :

Prelego : "La Jaro de Internacia Kunlaboro".

Oficiala malfermo de Esperanta ekspozicio en la halo de la Festpalaco.

12.00 h Akcepto ĉe la urbodomo.

13.00 h Fotado de la kongresantoj sur la perono.

Posttagmeze : Diversaj vizitoj (laŭelekte) :

boatekskursoj - muzeoj - strando - kazino (Kursaal).

18.00 h Sankta mezo.

19.00 h Bankedo kaj poste granda balo en la luksaj salonoj de la festpalaco (pokapa partoprenprezo : 150 BF = 15 FF).

Lunde 7-an de junio : Ekskurso (200 BF = 20 FF).

OSTENDO atendas vin je Pentekosto. VENU MULTNOMBRE!

La Federacia Estraro.

Petu pri aliĝiloj, turnante vin al :

S-ro MAERTENS G., Pr. Leopoldstraat, 51, SINT-KRUIS (Belgujo).

La Gazetaro kaj ni :

LION : En sia numero 122 (januara), la oficiala revuo de "Lions international" aperigis 5-paĝan franclingvan artikolon de D-ro BERLOT pri la lingva problemo kaj Esperanto. D-ro BERLOT estas la tradukinto de la verko de Jean ROSTAND : "Tio, kion mi kredas".

LION estas eldonata en 11 lingvoj.

Pri la diversaj signifoj de la vorto "Esperanto".

La senco de "Esperanto" plilarĝiĝis kaj, verŝajne, estontece, la vortaroj aldonos la novsignifajn difinojn.

Jam, la franca verkisto Jean COCTEAU, parolante pri kubismo, nomis ĝin "esperanto en pentrarto", ĉar en kubismo oni ĉie renkontas la samajn (geometriajn) formojn.

En la pariza ĵurnalo "Le Figaro" (29-an de marto 1965), desub la plumo de S-ro Pierre de LATRIL, Esperanto alprenis la signifon de "harmonia normigo", de "la adoptenda sistemo". Lia artikolo pritraktas la kolortelevidon kaj titoliĝas jene : "Ĉu la Eŭropanoj elektos "teknikan esperanton"... por eviti la kakofonion, kiun naskus la tri proponataj sistemoj.

AMIENS (Somme) - Nun, la loka grupo disponas sidejon. Antaŭ nelonge, okazis kunveno; kaj la ĉeestantoj decidis aranĝi la ĉi-jaran federacian kongreson. Brave!

Bonvolu noti : La federacia kongreso de NFEF okazos en Amiens, la 10-an de oktobro.

BOURBOURG (Nord) - Ni ĝoje eksciis, ke federacianino, F-ino Claude VASSEUR, brile sukcesis ĉe la supera pianokonkurso de UFAM en Parizo, okazinta ĉe la rusa konservatorio. Ĉefpremio kronis ŝian talentan ludadon. Ni varme gratulas, dezirante al ŝi pliajn sukcesojn sur tiu muzika kampo.

Adreso : F-ino Claude VASSEUR, 14, rue Carnot, BOURBOURG (Nord).

MERICOURT (P.-de-C.) - S-ino Van PARYS fondis Esperanto-grupon. Ĝi nombras 19 membrojn kaj alprenis la nomon "Frateco".

Kolektado de la UEA-proponoj al Uno  
okaze de la jaro de Internacia Kunlaboro (daŭrigo)  
Subskribis :

MERICOURT : la urbestro, S-ro HOTTE kaj la Laika Amikaro (700 membroj).

NOYELLES-GODAULT : 5 seminarianoj, 14 ĝeinstruistoj kaj unu kuracisto.

HENIN-LIETARD : 6 instruistoj de la lerneja grupo Pantigny.

TOURCOING (Nord) - Okazis ĉe la Kultura Centri debato pri la esperantista gazetaro, kiu jam havas ĉirkaŭ unu milionon da legantoj en la tuta mondo.

La kotizoj por urbaj kaj eksterurbaj simpatiantaj membroj estas jenaj : ordinara membro : 2 Fr. - membro kun prospekta abono : 3 Fr., ĝirotaj al :

Association Culturelle TOURCOING-ESPERANTO,  
48, rue Marc-Sangnier, TOURCOING - CCP. LILLE 1995-97.

ROYE (Somme) :

Malavara donaco : S-ro Michel LEDANOIS donacis 20 Fr por la propagando.

Ni varme dankas pro ĉi tiu mona apogo.

Komuniko : Nia kasisto petas la federacianon, kiu ĝiris subtenan kotizon, la 10-an de marto, ke li anoncu sin, ĉar li ne ricevis la ĝirilon, kaj sekve ne scias, kiu pagis.

Skribu al :

S-ro Jacques DOYELLE,  
9, rue de Dunkerque,  
BOURBOURG  
(62).

Radioelsendoj :

RADIO-VARSOVIO - "Sub la verda stelo" 28/2/65.

En sia dimanĉa rubriko, la pola sendstacio favore menciis la intervjuon ĉe Radio-Luxembourg, de S-ro Edouard BONVOISI (Calais) pri Junularo kaj Esperanto. Gratulon!

Jean THEVENOT : Programestro ĉe la franca radio (pri magnetofon-amatoroj) kaj televido ("Le Grand Voyage"), S-ro THEVENOT konsentis menci i la magnetofonan servon de UEA en proksimaj elsendoj kaj artikoletoj en fakaj revuoj.

GERMANUJO : La novaj franclingvaj programoj de Deutschlandfunk (Köln : Kolonjo) - respondis vendrede 12-an de marto al letero de aŭskultanto pri magnetofon-amatoroj, junulargastetoj kaj Esperanto.

La koncerna elsendo okazas de 22.30 h. ĝis 23.10 h. , laŭ la ondolongo 195 m.

HISPANUJO : Radio Bilbao denove disaŭdigas programon en Esperanto : Ĉiun merkredon, de 23.30 h. ĝis 23.50 h. , per ondo 265 m.

Atesto pri kapableco : Detraduko.

Parolado de D-ro ZAMENHOF ĉe la 8-a Kongreso en Krakovo (1912).

En lingvo natura, ĉiu, eĉ plej granda efektiva malbonaĵo, neniun incitas eĉ neniun medietigas kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita, ĉio saĝas al ni kritikinda; ĉiu bagatelo kiu ne estas konforma al nia gusto pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado.

Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudek-kvin-jara vivo!

Se ĝi tamen ĉion same eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek-kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam plifortigante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortigante sian tutan difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, ni povas pri tio sincere nin gratuli.

ALVOKO :

Profesoro en lernejo Alĝera, S-ro TALAZAC Jean intencas krei bibliotekon kaj Esperanto-klubon. Tiucele, li petas :

- 1) - Ke oni donacu al la lernejo kelkajn esperantlingvajn librojn kaj revuojn;
- 2) - la sendadon de bildkartoj aŭ afiŝoj diversregionaj kaj de grupfotoj por ornami la lernoĉambron.

Tre gravas, ke E-o disvastiĝu en Alĝerio, ĉar tiu fakto ebligos, ke ĝi penetru en la araban mondon k la Nigran Afrikon.

Ĉion oni sendu al : S-ro TALAZAC Jean - Ecole de garçons,  
CHATEAUNEUF (El Biar) - ALGER (Algérie).

### Strebado por internacia lingvo (sekvo)

La eltrovo de Presarto estis decidiga etapo por la civilizacio. Ĝi signas la komenciĝon de nova epoko en la historio de la Homaro; ĝi estas la fino de Mezepoko k komenciĝo de la Moderna Tempo. Ebligante al la idearo penetri ĉiujn sociajn klasojn, Presarto trabis la vojon al la multaj malkovroj, pri kiuj fieras la nuntempa mondo. Ĝi ankaŭ ludis alian rolon. Ĝis tiu tempo, la homaj lingvaĵoj tre malsamis unu la alian. Sekve de la kreskiĝanta nombro da individuoj, po triboj ariĝantaj en novkonkeritajn teritoriojn, kaj ĉefe pro la preskaŭ neekzistantaj rilatoj inter ili, la lingva evoluado montriĝis rimarkeble diferenciga

La Gutenberga malkovro k kreado de la moderna tekniko iel renversis tiun evoluadon, kiu de tiam fariĝis unueciga. Efektive, la ebleco de spirita interkompreniĝo pere de Presarto, la teknikaj atingiĝoj k la konceptitaj aŭ kreitaj komunikiloj aŭ interpenetriĝoj, ĉio ĉi pli k pli sentigis al la homoj la bezonon de samlingveco. Tiel formiĝis la naciaj lingvoj: k diversaj dialektoj parolatiĝis sur unuopa teritorio. La plej tipan ekzemplon de tiu ĉi unueciga fenomeno prezentas la germana lingvo.

Por igi siajn verkojn komprenataj de kiel eble plej granda nombro da ĝermanaj legantoj, la verkintoj de la unuaj presitaj beletraj kontribuajĵoj (ĉefe dum la Reformacio) devis redakti ilin per lingvo komprenebla de la granda plimulto. Por tio ili do devis uzi la lingvon de kancelarioj, kiun ili pliriĉigis per vortoj k dirmanieroj la plej komunaj k la plej uzataj en la diversaj ĝermanaj dialektoj. Sekve naskiĝis la komuna germana lingvo.

La Gutenberga elpenaĵo del rezultigis la unuecigon de la dialektoj. Iom post iom, ĝi transformis ilin en beletran nacian lingvon, komunan al la diversrasaj germanaj popoloj. La konstata, eĉ mirindega disvolviĝo de la internaciaj rilatoj, de post la komenciĝo de tiu ĉi jarcento, ege transpasas la malvastan k limigitan kadron, en kiu ili okazis dum la Antikvaj Tempoj k Mezepoko. Rekta rezulto de la multaj modernaj malkovroj teknikaj k sciencaj, tiu disvolviĝo igas pli aktuala, pli urĝa, pli nepara ol iam ajn la praktikan solvado de la problemo pri universala helplingvo.

(Sekvota)

Claude VERNAY (el "Historique du mouvement espérantiste à Dunkerque")  
Elfranciĝis : Lucien BOURGOIS.

---

Bulteno ofsete presita de : Centre National Espéranto-Office,  
9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, Orléans (Loiret).

Le Gérant Resp. : Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, NOYELLES-GODAULT,  
(Pas-de-Calais).